(9) Komparu rim. 6

(10) Mao Ce-tung, citita laŭ Robert Payne: »Mao Tse-tung, ein biographie« (Mao Ce-tung, biografio), Hamburg, 1950, paĝo 125.

(11) Reproduktita en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio), aldono, tabulo 4.

(12) Citita laŭ Josef Hindeles: »Hitler war kein Zufall; ein Beitrag zur Sociologie der Nazibarbarei« (Hitler ne estis hazardo; kontribuo al la sociologio pri la nazia barbaraĵo), Europa-Verlag, Wien, 1962, paĝo 53.

(13) Komparu Wilfried Daim: »Der Mann, der Hitler die Ideen gab« (La viro, kiu liveris al Hitler la ideojn), Isar-Verlag, München, 1958.

(14) Komparu la reproduktaĵon de titolpaĝo de »Der Stürmer« (La sturmanto) en »Die kastenlose Gesellschaft« (La senkasta socio), aldono, tabulo 5.

(15) Wilfreid Daim: »Totaler Untergang?« (Ĉu universala pereo?), Manz-Verlag, München, 1959.

(16) Mal. 3, 23-24.

*(Laŭ represo en »Österreichische Monatshefte«, kajero 6/7, julio-aŭgusto 1962 paĝo 19 sekv. tradukita el germana lingvo de Klaus Perko)*



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

301.17+159.9:408.92

## DIREKTOJ DE PSIKOSOCIAJ ESPLOROJ PRI LA ESPERANTO-MOVADO*

(M. Dobrzyński, Varsovio, Pollando)

Disvolvo de la socia evento kiun oni nomas Esperanto-movado ne devas esti lasita al hazardaj fortoj. Kontraŭe, ĝi povas esti konscie kondukata. Sed por racie gvidi la movadon oni bezonas komplekson da gravaj kaj fidindaj informoj pri ĝi, kiuj estas atingeblaj pere de la plana scienca esplorado celanta:

Unue — malkvroon de faktoroj ob staklantaj disvolvon de la movado Ekkoninte ilin oni povas malgrandigi ilian influon.

Due — montro de faktoroj al disvolvo de la movado.

Nur post la ekkono de plej gravaj fortoj influantaj movadon oni povas jungi ilin al la servo favora por movadaj celoj.

Manko de koncernaj esploroj instigis min prikonsideri eblecojn krei bazon por komence enkonduka pristudo de la Esperanto-movado el psikosocia vidpunkto.

Tamen antaŭ ĉio ni interkonsentu pri kelkaj terminoj . . .

Kiam certaj bezonoj de iu socia grupo ne estas plenigataj, kreiĝas en ĝi stato de malkontento, kiun membroj de la grupo penas forigi. Se tiuj penoj transformiĝas en aran inklinon celanta realigi la komunan celon, tiam kreiĝas **socia movado**[1]). Pri ĝia karaktero decidas speco de problemoj, kiujn koncernas ĉitiu socia malkontento kaj ecoj de grupo kiun ĝi tuŝas. A. M. Rose[2]) diferencigas tri kategoriojn de sociaj movadoj:

En **reformemaj** movadoj malkontento tuŝas limigitan aron da homoj kaj ne koncernas iliajn fundamentajn bezonojn. Tiaspecaj movadoj laŭprincipe ne renkontiĝas kun perforta kontraŭago. Al tiu kategorio ni apartenigu esperantismon. Du aliaj estas revoluciaj kaj ekspresivaj (expressive) movadoj.

---

*Prelego, recivinta la unuan premion, dum la III Studenta internacia scienca seminaro en Toruń (Pollando), aprilo 1966.

[1]) Laŭ prelegoj de prof. Szczepański (Marĝene: septembre 1966 li estis elektita prezidanto de Monda Sociologia Asocio).

[2]) Sociology. New York 1956, p. 347 kaj aliaj.

Ni interkonsentu ankaŭ, ke ĉefaj elementoj de reformema movado estas:

a) »ideologio« komprenata ne nur kiel pruvaro de ĝiaj celoj, sed pli larĝe, kiel kultura akiraĵo kaj tradicio de movado
b) **homoj** aliĝintaj al la movado, kiuj estas kunligataj en
c) movadaj **organizoj**.

Esplorado de la Esperanto-movado el psikosociologia vidpunkto estas en nuna stato tre malfacila pro teoriaj kaj teknikaj kaŭzoj. Tamen ŝajne oni havigas pli certan fundamenton por esplorado, se oni komencus ĝin ek de problemoj koncernantaj formalan organizon de la movado. Do, enkondukajn studojn ni direktigu al formaligitaj, instituciigitaj elementoj de la movado. Ĉi-sube mi provas detaligi objektojn de studo pri organizo de la Esperanto-movado. Kompreneble la suba listo ne pretendas al kompleteco. Same grupigo de la problemoj bezonas pridiskuton.

## I. Strukturoj

Strukturo de la movada organizo kompare kun tiu entreprena elŝovas al unua plano malsamajn problemojn. Konsistigas ĝin fakte formalaj strukturoj:

1. **Administra**, enkadriganta pagatajn oficistojn. Kelkfoje ĝi estas relative larĝa. Jam dekpersona oficejo plenumanta multspecajn nespecialigitajn taskojn kaŭzas aron da problemoj koncernantaj dividonon de taskoj, povon kaj respondecon de ĉiu opa oficisto.

2. **Memgvida**, kiu enkadrigas elektatajn funkciulojn, laŭformale gvidatajn movadajn organizojn. Limigita kvanto da homaj kaj materiaj fortoj de la Esperanto-movado devigas funkciulojn al mempersona plenigado de pure oficista laboro, kio kaŭzas reciprokan laŭfunkcian interpenetrigadon de ambaŭ strukturoj — administra kaj memgvida. Tia sistemo naskas problemojn de gvidado ne renkontatajn en industria aŭ komerca organizo. Ĉefan celon de tiudirektaj esploroj mi vidas en trovo de optimuma formala strukturo de movadaj institucioj, kio precipe urĝas sur la nivelo de landaj asocioj.

3. Gravegan rolon en la plej multo da (precipe malgrandaj) organizoj ludas ĝia **neformala strukturo** en kiu speguliĝas senperaj interhomaj ligoj. Pluraj el nunaj agantoj neniam aliĝus al la movado, se ili ne trovus en ĝi personojn en kies akompano ili volonte pasigas sian tempon. Do, ni esploru rolon en la movado de tiuj »rondoj de reciproka adorado«. Ĝi ne devas esti negativa, kontraŭe, oni facile trovas urbojn kie Esperanto tute ne ekzistus, se ĝi ne estus konservata ĝuste en tiajn rondoj.

4. **Reto kaj rimedoj de komunikado** en la Esperanto-movado ludas precipe gravan rolon, ĉefe pro fakto, ke ĝia relative malgranda membraro disiĝis sur tutmonda surfaco. La gvidantaro devas precize koni strukturon de informkanala reto, fontojn de bruoj deformigantaj informojn, punktojn kie ekzistas danĝero rompi kanalojn... Ankaŭ rimedoj de informado ne estas indiferentaj por ĝia efikeco. Ja malsamajn rimedojn bezonas interna kaj ekstera informado, malsamajn — elstara kaj larĝa publiko...

5. Gvidanto de armeo por funkciigi ĝin dum batalo devas konscii pri disponeblaj homaj fortoj. Samo koncernas movadon. Do, ekzistas bezono de studoj pri ĝia **demografia strukturo** vidpunkte de aĝo, gepatra lingvo, geografia kaj politika situoj kaj ankaŭ vidpunkte de profesiaj kvalitoj kaj sociaj influoj de unuopaj esperantistoj. La menciitaj informoj ebligos ĝuste organizi interne la movadon kaj pli trafe plani agadon direktitan eksteren.

## II. Problemoj de gvidado

Gvidanto de movada organizo posedas relative malgrandan motivigan influon al siaj kunlaborantoj. Direktoro de entrepreno povas pagi pli aŭ malpli al siaj subuloj. premii ilin aŭ ne, dungi aŭ maldungi... Gvidanto de la movada organizo ne disponas per tiaj rimedoj. Liaj armiloj estas nur persona aŭtoritato kaj espero ke kunlaborantoj konscias celon de komunaj penoj kaj aliĝis al ĝia realigado same mense kiel emocie. Do, motivoj de longedaŭra kontribuado favore al la movado baziĝas sur altrangaj sociaj psikobezonoj. La gvidanto devas precize scii kiaspecaj motivoj ludas ĉefan rolon ĉe liaj kunlaborantoj, kiun el siaj psikobezonoj ili deziras satisfakciigi per sia laboro al la organizo. Jen kelkaj direktoj de tiutema esplorado:

1. Individua **motivaro de aliĝo al movado.** Oni observas, ke nur malgranda kvanto da komencantoj fidelas al la Esperanto-movado pli longe ol kelkajn monatojn, tamen restantaj sindonas por ĝi ofte ĝis fino de la vivo. Jen stariĝas demandoj: kial unu individuo venas al la movado, dume alia tute ne interesiĝas pri ĝi? Kial unu lasas ĝin post mallonga tempo, dume alia fariĝas sindona aganto por ĉiam? Do ni staras unuflanke antaŭ demando pri kondiĉoj de integrado de opuloj en movadaj organizoj kaj aliflanke antaŭ demando pri procedo de identifikado de individuaj celoj kun tiuj de movado. Pli simple: kiel opulo venas al konvinko ke liaj propraj celoj egalas la movadajn?

2. La saman demandon oni povas rigardi aliflanke, nome: kio kaŭzas **dizintegradon de la movado?** Kio disrompas ĝin? Foje okazas, ke aktualaj bezonoj de opaj movadaj elementoj (kiel menciite movado konsistiĝas el ideologio, organizo kaj homoj) ne estas samaj aŭ eĉ pli, ke ili konkurencas inter si. Se konflikto tuŝas nivelon de landa aŭ monda organizo ĝi kaŭzas gravan malprogreson de la tuta movado.

3. Problemoj de iniciato kaj planado de organiza evoluo konsistigas iom apartan grupon. En la Esperanto-movado ekzistas abunda materialo pri tiu temo. Pluro de proponoj kiuj en sia ĉefa senco ofte estas nerealaj povas esti realigeblaj parte aŭ en alia sfero de la movada agado. Ni rememorigu al ni metodon de grupa solvado de problemoj konata sub la nomo »cerba sturmado« (brainstorming). Jen kunveninta aro de fakuloj »ĵetas« diversajn proponojn celante solvi starigitan problemon. Post kompilo kaj reciproka komparo de kolektitaj ideoj oni prilaboras finan solvon, konsiderante ankaŭ proponojn ŝajne absurdajn, ĉar post la transformiĝo ili povas esti utilaj. Same projektoj de pensemaj sammovadanoj ĉiuokaze meritas pridiskuton ĉar en ili ofte troviĝas valora semo.

### III. Eksteraj rilatoj de organizo

Ĉiu organizo agas en sia medio, konsistiĝanta el aro da sociaj, kulturaj, ekonomiaj, teknikaj kaj eĉ biologiaj kondiĉoj. Graveco de eksteraj rilatoj estas precipe konsiderinda por tiaspeca movado kiel esperantismo. Jen la plej urĝaj demandoj:

1. Kiaj sociaj kondiĉoj precipe favoras al disvolvo de la movado?
2. Kiuj direktoj de eksteraj rilatoj plej esperigas?
3. Kiuj remedoj plej efikas el vidpunkto de movadaj celoj kaj kiuj estas plej ekonomiaj?

Ŝajne plej efika paŝo en disvolvo de esperantismo estus anstataŭigo de privata UEA per organizo interŝtata. Jen stariĝas nova demando: kiom da ŝancoj havas la Esperanto-movado por atingi tion? Kiuj rimedoj de publikaj rilatoj plej efikas en ĝia diskonigo? Alivorte: kiel agi eksteren posedante difinitajn fortojn kaj situacion?

Fine ni kolektu ĉefajn ideojn de ĵusa prilaboraĵo:

1. La Esperanto-movado por plua disvolvo bezonas detalajn kaj firmajn informojn pri si mem atingeblajn pere de la scienca esplorado.
2. Por koordini fortojn agantajn tiudirekten estas bezonata ampleksa plano de esploroj.
3. Plej esperigan vojon por komencaj studoj la aŭtoro vidas en esplorado de movadaj institucioj kaj organizoj.



SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

347.957 + 233

## PRI LA ESENCO DE LA REVANDIKACIO[1])

### (rilate al la bulgara civila juro)

(Lj. Mihajlov, Sofio, Bulgario)

La enradikiĝinta difino de la revandikacia postulo, ke ĝi estas postulo de la neposedanta proprietulo kontraŭ la posedanta neproprietulo ne nur neplene, sed ankaŭ neprecize respegulas la escencon de la postulo. La revandikacia postulo estas nek postulo de ĉiu neposedanta proprietulo, nek postulo kontraŭ ĉiu posedanta neproprietulo. La revandikacia postulo ankaŭ ne estas postulo nur de la proprietulo.

La revandikacia postulo prezentas defendon de tiuj realaj rajtoj[2]), kiuj inkluzivas en sia enhavo rajtpovon por posedi la materian aĵon, kiu estas objekto de la rajto. La revandikacia postulo estas defendo de la rajtpovo por posedi. La defendo, kiun la revandikacia postulo donos al la rajtpovo por posedi, konsistas en la ebleco esti redonita la posedo al la titolulo de la reala rajto, t. e. esti restituita la posedo, ĉu senpera, ĉu pera, depende de tio, de kia posedo estas senigita la titolulo de la reala rajto. Estante postulo por defendi la rajtpovon por posedi, la revandikacia postulo defendas ne nur la realan rajton de proprieteco, sed ankaŭ la ceterajn realajn rajtojn, en la enhavo de kiuj estas inkluzivita la rajtpovo por posedi.

La revandikacia postulo estas rimedo por batalo kontraŭ la rompiĝoj de la reala rajtpovo por posedi, rimedo por forigo de tiaj

1) revindication (A) ,revendication (F), Vindikation (G), rivendicazione (I), vindikacija (R).
2) right in rem (A), droit réel (F), dingliches Recht (G), diritto reale (I), vještnoe pravo (R).